Hermann Löns,

# Nobla ĉasaĵo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Ĉasist' libera estas mi
En vasta ĉasadej',
Havanta ĉaso-rajton en
La tuta erikej'.

Laŭplaĉe ĝis la horizont'
Ĉasadi rajtas mi
Je cervoj, kapreoloj kaj
Ĉasbestoj ĉiuj ĉi.

Sed kion pleje ŝatas mi
En tuta la are',
Nek estas kapreol' nek cerv',
Ĉasbeto estas ne.

Ĝi estas freŝa knabinet',
Je kiu ĉasas mi
Ol je la cerv' kaj ĉiu best'
Volonte multe pli.

Kaj ke ne apartenas ĝi
Al mi, ne ĝenas min.
Ĉasist' libera estas mi,
Mi tamen ĉasas ĝin.

*Traduko de la Germana poemo "Edelwild" de* Hermann Löns *(∗1866-08-29 – †1914-09-26) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04).*

*Arg-623-1259 (2012-10-22 18:53:30)*

*Pri la aŭtoro vidu la retejojn* `http://de.wikipedia.org/wiki/Hermann_L%C3%B6ns` *kaj* `http://www.loens-verband.de/`.